

Eduard Ebel,  
Milde falas la neĝ'

*tradukita de N. N. 01*

Milde falas la neĝ',  
Lago silentas en preĝ',  
Arboj en brilblanka vest'.  
Ĝoju pri kristnaska fest !

Nun varmiĝas la kor',  
Ĉesas ĉagren' kaj dolor',  
Ĝoju pri Dia ĉeest'.  
Ĝoju pri kristnaska fest!

Sankta nokto de Di',  
Vekas anĝelhoron ĝi,  
Sonas ĉarmega atest':  
Ĝoju pri kristnaska fest'!

*Traduko de la Germana poemo "Leise rieselt der Schnee" de EDUARD EBEL (Eduardo Ebelo, \*1839 – †1905)  
en Esperanton de N. N. 01.*

*MR-012-NN-1 / Arg-99-201 (2003-12-11 08:46:13)*

*MR-012-NN-1*